La Riverego

Novembro 2002 | Esperanto-Societo Kebekia | Nro 69, Jaro 16a

# Sukcesa 9a Internacia Semajnfino

**La 9a ISE en Okemo, Vermonto estas parto de pasinteco... de nia movada pasinteco. Mi revenis feliĉa el ĝi ĉar kun la tempo oni sentas ke tiu semajnfino estas nun parto de Esperantio. Dum la tri tagoj eblis sperti amikecon pere de Esperanto, kaj tio estis mia celo dekomence. Krei la eblecon vere vivi esperante de mateno ĝis noktomezo...**

Nu, mi rakontu pri la programo.

La temo estis "Instrui pri nova mondo" kaj ni invitis Arnoldo Victor instrui la bazan kurson per la Ĉe-metodo kaj Boris Kolker la mezan kurson per sia instrulibro "Vojaĝo al esperanto-lando". Ambaŭ kursoj estis tre sukcesaj. Por la 'lertuloj' okazis plej diversaj prelegoj kiel : 'Mia afrika vojaĝo', 'Kio estas Pasporta Servo', 'Revuoj en E', 'Historio de la E-movado en Rusio', 'Indiĝenaj kulturoj kaj lingvoj de Nordokcidenta Nord-Ameriko', ktp.

La amikeca vespero plensukcese okazis kun vigla partopreno kaj la komuna bufeda festa vespermanĝo estis bunta kiel kutime. La kultura vespero iel rapide finiĝis je la 21-a horo ĉar la propono prezenti vidbendojn pri la IJK en Brazilo allogis malmultajn homojn ... Tamen la gejunuloj kunuĝis ĉe nia loĝejo kaj ĝis la 2-a matene bone amuziĝis.

En la 9-a ISE partoprenis 35 usonanoj, 17 kanadanoj kaj 3 eksterlandanoj, do sume 55 personoj. En 2003, ni celu esti almenaŭ 75 homoj por kunfesti la dekan jariĝon.

*Normando Fleury*

# On vous attend pour les 20 ans !

**Depuis 1982, la Société québécoise d'espéranto fait la promotion des avantages de l'espéranto comme langue de communication neutre et efficace. Où en sommes-nous après 20 ans ?**

Nous vous invitons à prendre part à la fin de semaine qui clôturera le 20-e anniversaire de la SQE. En voici le programme:

**Vendredi le 13 décembre**

-En soirée : Accueil et hébergement dans des familles espérantophones

**Samedi le 14 décembre**

10h : Maison de l'espéranto, 6358 rue de Bordeaux, Montréal - Métro Beaubien

-Discussion sur l'avenir de l'espéranto au Québec !

12 h : Dîner au quartier chinois et visite du Centre d'histoire de Montréal

18h: Grande fête avec souper communautaire au Jardin botanique de Montréal.

4101 rue Sherbrooke Est, Métro Pie IX, Complexe d'accueil des serres.

Stationnement gratuit
-Retrouvailles avec les anciens
-Historique de la SQE
-Musique folklorique
-Prix de présence

**Dimanche le 15 décembre**

11 h : Brunch au Commensal, 1720 rue Saint-Denis, Métro Berri-UQAM
Visite d'un musée au choix...

# Ni ŝategus festi kun vi !

Ekde 1982, la Esperanto-Societo Kebekia aktivas favore al la disvastigo de Esperanto en Kebekio. Estas ja tempo por festadi tion kaj pripensi la estonton.
Ni sincere invitas vin partopreni la E-semajnfinon en Montrealo por festi la 20-an jariĝon de ESK. Jen la programo:

**Vendredo la 13-an de decembro**

-Vespere : Bonvenigo kaj gastigado laŭ Pasporta Servo

**Sabato la 14-an de decembro**

10 h : Esperanto-Domo, 6358 rue de Bordeaux, Montréal - Metroo Beaubien
Diskuto pri la estonto de Esperanto en Kebekio

12 h : Tagmanĝo en la Ĉina Kvartalo
Vizito al la Muzeo pri Montreala Historio

18 h : Granda festo kun komuna bufeda manĝo ĉe la Montreala Botanika Ĝardeno
4101 rue Sherbrooke Est, Metroo Pie IX, Enirejo de la vitro-domoj
Senpaga parkado

-Amika konatigo kun junaj kaj maljunaj esperantistoj

## Rakontu viajn vojaĝojn aŭ viajn gastigadojn sur la reto!

Mi nuntempe estas serĉanta tekstojn de personoj, kiuj vojaĝis uzante Esperanton aŭ kiuj gastigis Esperantistojn de aliaj landoj pere de la Pasporta Servo, kadre de la finpretigado de la retpaĝaro de ESK.

Se vi volas rakonti pri viaj aventuroj aŭ kontaktoj kun eksterlandanoj, bonvolu sendi al mi vian tekston, kiu povas esti tiel longa (aŭ mallonga) kiel vi deziras.

Vi povas povas sendi ĝin poŝte al la adreso de ESK aŭ retpoŝte (mi preferus tion), al la adreso jessylapointe@hotmail.com.

Mi ankaŭ bonvenigas fotojn, poŝtkartojn, ktp. Ili povos aperi surrete apud via teksto.

*Jessy LaPointe*

**Les aléas de la livraison**

Vous aurez sans doute remarqué que la livraison de la revue *Le Monde de l'espéranto* n'est pas tout à fait... régulière.

Cela tient au fait que la revue nous est d'abord envoyée par colis aérien ordinaire. C'est l'option que nous avons choisie afin de maintenir vos coûts d'adhésion le plus bas possible. Cependant, ce procédé ne nous permet pas de connaître à l'avance la date d'arrivée de la prochaine édition. Ce qui complique quelque peu la gestion de nos propres envois.

Cela vaut aussi pour les membres qui ne sont pas abonnés à la revue française, puisque nous attendons toujours la réception du *Monde de l'espéranto* pour procéder à l'envoi de *La Riverego*.

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto six fois par année. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10$.
La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia sesfoje dum la jaro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2002.12.15**
jessylapointe@hotmail.com

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury, kaj Sylvain Auclair (Korektado). Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario) kaj François Bay.

**Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto**
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
esperanto@sympatico.ca
http://www3.sympatico.ca/esperanto